

# La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. N°10



## Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №10 (276)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

**Aperas** ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

**Eldonas kaj administras:** Halina Gorecka

**Redaktas:** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj:** Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajjevo, Sergio Pokrovskij, Alexander Shlafer, Andrzej Sochacki

**Poŝta adreso:** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Retpoŝtaj adresoj:** sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

**Retejoj:** <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

**Perantoj.** Vidu la liston sur p. 68-69.

### Abontarifo por 2017 kaj 2018

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

### Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj:** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

**Recenzoj:** Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

**Represo:** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2017, №10 (276).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 октября 2017 г.

© La Ondo de Esperanto, 2017.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> .....	2
En ĉi tiu numero .....	3
<b>Temo</b> .....	<b>5</b>
Tobiasz Kaźmierski. Ne kompatu min! .....	6
Przemysław Wierzbowski. UEA: Ankoraŭ unu demisio .....	8
<b>Eventoj</b> .....	<b>9</b>
Paweł Fischer-Kotowski. Esperante kaj kulture en Poznań .....	10
Ilona Koutny. 20 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj .....	11
Jadwiga Greger, Halina Gorecka. Somero kun Esperanto ĉe la Balta maro .....	13
Renardo Fössmeier. AIS sesiis en Varsovio .....	15
Alessandro Mazzetti. Velado al kongreso .....	16
Renato Corsetti. La 84a Itala Kongreso de Esperanto .....	17
Povilas Jegorovas. Zamenhof-ekspozicio: Post Vilno ankaŭ en Kaŭno .....	20
Jovan Mirkovič. Bongusta bograĉfesto 2017 .....	22
Alvoko al artistoj por la 103a UK .....	23
UEA invitas prelegi en la IKU-sesio en Lisbono .....	23
Mark Fettes, Martin Schäffer. UEA prognozas enorman deficiton por 2017 .....	24
EU financos la Esperanto-projekton "Lingva Akcelilo" .....	25
Bert Ŝuman. Vigla somero en la Esperanto-kastelo .....	26
La 38a Kataluna Kongreso en Àger atendas vin .....	27
Lu Wunsch-Rolshoven. <i>Kajto</i> koncertos kvarope ĉi-jarfine en Saarbrücken .....	27
Nekrologoj .....	28
Koncize (11 informoj) .....	29
<b>Tribuno</b> .....	<b>30</b>
Ian Fantom. Ĉu ni dronas en politika korekteco? ( <i>Vidpunkto</i> ) .....	31
Chamberline Nguiefack. Demisiis la konsulino de la Esperanta Civito .....	35
Forumanoj interpelacias la Konsulinon .....	38
Johan Derks. La ombrostrukturo de UEA .....	39
Malferma Tago en Roterdamo .....	40
Aktuala problemo – sekstekstado kaj reta pornografio .....	41
La nova Tekstaro .....	43
<b>Arkivo</b> .....	<b>44</b>
Ralph Harry .....	45
Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2017 .....	47

<b>Kulturo</b> .....	<b>48</b>
Ludmila Novikova. Ĉielido kun cigna animo .....	49
Sabine Fiedler. Mozaiko da eminentuloj konataj kaj nekonataj (Recenzo: Ed Borsboom. <i>Kie miozotas memor</i> ) .....	60
Ricevitaj gazetoj .....	61
K <sup>io</sup> Duoble Unu, FaMo, Fransŭaz Rochette. Muzika projekto: Brel en Esperanto. ....	62
Halina Gorecka. Literatura konkurso <i>Liro-2017</i> . ....	63

<b>Mozaiko</b> .....	<b>64</b>
Pri kiu(j) temas? La fina rezulto .....	65
Valentin Melnikov. Kelkaj konsiloj por plibonigi sian stilon .....	65
Kukucapa Nemoskovskaja. Kurioza kredito .....	66
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj .....	67
Kiel aboni <i>La Ondon</i> .....	68

Kompilante la enhavtabelon de la oktobra *Ondo*, ni subite ekpensis, ke, pro la artikoloj pri lastatempaj problemoj en UEA kaj en la Esperanta Civito, kelkaj legantoj eble taksos ĉi tiun numeron tro kritika. Tamen ne estis nia intenco kolekti kaj aperigi plurajn kritikajn artikolojn – ili nur respegulas la realaĵojn en la nuntempa Esperantujo, kaj ilin apudas raportoj pri multaj sukcesaj esperantistaj iniciatoj. Se temas pri nia vera ĉi-monata intenco, ĝi estas videbla sur la kovropaĝo, kaj la plej ampleksa oktobra materialo estas dediĉita al Marina Cvetajeva okaze de la 125a naskiĝdatreveno de ĉi tiu rusa poetino.

## Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2017: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>


Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

# Temo



En la postkongresa *Ondo* (p. 44) vi povis legi pri la demisio de Tobiasz Kaźmierski. Por ĉesigi onidirojn, kiujn provokis ĉi tiu informo, ni petis lin klarigi la kaŭzojn de la ekŝigo. Vidu lian klarigon en la sekvaj paĝoj. Ni esperas, ke ankaŭ la Ĝenerala Direktoro de UEA, kiu pro multaj urĝaĵoj ne povis ĉi-monate prezenti sian opinion, antaŭ la pretigo de la novembra *Ondo* trovos liberan duonhoron por respondi niajn demandojn pri la lastatempa evoluo de la Centra Oficejo.



Tobiasz Kaźmierski kaj Clay Magalhães

## Ne kompatu min!

Ĵus finiĝis Arkones en Poznano. Kompreneble, dum la festivalo multaj el la partoprenantoj (el kiuj pluraj estas miaj amikoj) demandis pri mia postroterdama vivo kaj kialoj de mia aŭgusta demisio. En tono de tiuj demandoj mi ne malofte aŭdis kompaton. Superflue.

Ekde mia rezigno pasis pli ol unu monato. Demisioj mem estas ne tre eksterordinaraj kaj mi kredas, ke preskaŭ ĉiu demisiis almenaŭ unufoje en sia vivo. Kaj ekde la eksoficiĝo pasis pli-malpli du semajnoj. Ili estis plenaj de organiza laboro por Arkones kaj mastrumado de translokiĝa kaoso. Malgraŭ tio, mi fartas tute bone kaj ne estas mi, kiu meritas vian kompaton.

Mia eksoficiĝo estis funde pripensita faro kaj la decidon multe influis la nuna situacio en la Centra Oficejo de UEA. Ni ne nur perdis la talentan direktoron kaj kolegon Osmo Buller sed ankaŭ ricevis la novan Ĝeneralan Direktoron, kio ekde komenco ŝajnis esti stranga ludo aŭ malamuzza ŝerco de la Estraro. Mi povas konfesi, ke en la vespero antaŭ la elekto de Veronika Poór, mi flustris al Michael Boris, ke mi kredas, ke la nura kaj memkomprenebla kandidato estas Nikola Rašić kaj

du aliaj (novuloj) estas konsiderataj nur por montri, ke oni efektive ne limigis la ŝancojn de kontraŭkandidatoj. Rapide evidentiĝis, ke mi estas naivulo. Jam kelkajn tagojn poste la junularo gaje tostis je la sano de “ilia” nova Ĝenerala Direktoro. Poste evidentiĝis, ke ili estis ne malpli naivaj ol mi.

Samkiel antaŭe la nova Estraro sub la gvido de Mark Fettes, poste la nova Ĝenerala Direktoro ricevis krediton de fido (almenaŭ miaflanke). Ŝi estis afabla al ĉiuj kaj volis lerni kion ni faras, pri kio mi kaj aliaj kolegoj volonte klarigis. Ŝi estis entuziasma kaj havis iujn (ne ĉiam esprimitajn) planojn.

Bedaŭrinde, poste estis nur pli malbone. La malgrandiĝanta stabo ricevadis ĉiam pliajn “prioritatajn” taskojn. La Estraro de UEA venis kun novaj, foje komplete absurdaj ideoj, kaj la Direktoro verŝajne ne kapablis simple diri “ne”. Tion markis manko de sperto, intuicio pri rezultoj de propraj decidoj, malbona kono de Esperanto-movado kaj kapabloj de la oficejo. Rezulte pluraj membroj sentas sin neglektataj, ĉefaj servoj de UEA malboniĝis, promesita retpaĝaro verŝajne neniam lanĉiĝos, tamen ni ricevis novajn, sed praktike senutilajn retejojn Esperanto.net (kiu antaŭe funkciis relative bone kun nur volontula laboro), aktivulo.net (kiu jam gajnis la karesnomon “pasivulo”) kaj – mia plej ŝatata ekzemplo – la leterpapero de UEA. El tiu lasta en iom malklaraj cirkonstancoj malaperis mencio pri la kunlaboro kun Unesko kaj UN, kaj aldoniĝis la retadreso esperanto.net. Sed, eĉ pli absurde, oni forigis la malgrandan indikilon por faldado de leteroj, kio vere kolerigis miajn gekolegojn kaj aliflanke montriĝis, ke la ŝanĝoj en la CO okazas malantaŭ niaj dorsoj kun kompleta manko de scio pri nia laboro. Tio estas malgranda, sed simbola ŝanĝo, kiu montras la etoson en UEA. La listo de malsukcesoj estas pli longa, sed anstataŭ listigi ĉion, pli bone serĉi la fonton de tiuj fuŝoj por eviti ilin estonte. Jungi Stefan MacGill por solvi ĉiujn krizajn situaciojn estas tre provizora solvo.

Mi volas mencii ankaŭ la tiklan temon de la sendependiĝo de TEJO. Montriĝis, ke ankaŭ tiu subtenita de plejmulto projekto estis nekomplete prilaborita. Ni venis al la senprecedenca situacio, en kiu en unu UK oni aplaudas kaj agnoskas la sendependiĝon de TEJO, kaj jam en la sekva oni bezonas komisionon por solvi la krizon inter la du organizoj. Kaj jam nun estas klare, ke ne temis nur pri la persona konflikto inter la Ĝenerala Direktoro de UEA kaj TEJO-prezidanto, ĉar la prezidanto ŝanĝiĝis, sed la konflikto ne ŝajnas esti for. Mi ne volas aserti, ke TEJO ludas tute laŭ reguloj, kaj mi konsentas kun la UEA-Estraro, laŭ kiu TEJO havas ne niun rajton por diri, kiu estu kaj kiu ne estu la Ĝenerala Direktoro de UEA. Tamen domaĝe, ke anstataŭ la paca kunekzistado, regas la brutala milito, kiu tutcerte ne finiĝis en Seulo.

La Estraro, kvazaŭ ne flarante la fumon de la batalkampoj, decidis bruligi ankaŭ la Centran Oficejon. Dum la Seula UK, la oficistoj povis legi en *Libera Folio*, ke ili estas bonvenaj reduktiĝi aŭ labori malpli. Kaj la libroservo... ĝi prefere translokiĝu al malmultekosta mondoparto (almenaŭ parte). Bedaŭrinde ankaŭ pri aferoj, kiuj rekte influas la vivon de la CO-anoj, oni tute ne menciis eĉ vorton antaŭ peti aprobon de la Komitato. Tia politiko gvidas al degenero de la servoj de UEA kaj iom post iom al disfalo de la Centra Oficejo.

En tiu kunteksto gravas ankaŭ tio, ke post mia demisio, miaj kolegoj, precipe la KKS Clay Magalhães transprenis amason de novaj taskoj. Kiom longe tiuj kompatindaj homoj povos elteni? Mi ne scias, sed ĝis nun la Estraro ne faris alvokon por dungi novan kongresan asistanton. Ĉu ankaŭ por tio oni jam planas asigni la volontulojn aŭ lastmomente peti helpon de Stefan MacGill? Tio estas unu el pluraj demandoj, al kiuj nia gvidantaro devos baldaŭ respondi, prefere antaŭ la buĝeta aprobo. Ili jam bone scias pri la krizo en la Centra Oficejo kaj estos hontinde plu ŝajniĝi, ke nenio malbona okazas.


Tobiasz Kaźmierski

---

## UEA: Ankoraŭ unu demisio

Kiam mi decidis aliĝi al la teamo, konstruonta la novan retpaĝon de UEA, mi sentis grandan honoron kaj esperis partopreni en grava, profesie mastrumata projekto. Pro infanecaj kapricoj la Ĝenerala Direktoro de UEA senĉese enmiksiĝis en la konsiston de la teamo, ĉantaĝis unu el ĝiaj membroj kaj sukcesis konvinki la Estraron de UEA, antaŭ ĉio ĝian malobjektivan prezidanton, ke la laboro de tiu teamo estas maladekvata.

Anstataŭ aŭskulti ĉies voĉojn kaj vidpunktojn la Estraro decidis maldungi la menciitan teamanon. Mian vidpunkton pri la afero s-ro Fettes primokis kaj nomis "neprofesia". Sentante kolegan solidarecon kaj ne povante akcepti la normojn kaj neskribitajn regulojn, kiuj hodiaŭ regas la Centran Oficejon de UEA kaj la organizon ĝenerale, mi devis sen troa bedaŭro forlasi la postenon.



Przemysław Wierzbowski



# *Eventoj*



Post la kongresoj de UEA, SAT kaj ILEI, okazintaj somere en Koreio, la metropolo de Esperantujo en septembro migris al Pollando, kie aŭtun-komence okazis “Esperanto sur la Strando” en Triurbo, poste sesio de AIS en Varsovio, kaj tri sinsekvaj aranĝoj en Poznano: sesio de Interlingvistikaj Studoj, Interlingvistika Simpozio kaj la tradicia festivalo ARKONES, kies ĉefa evento estis koncerto de la populara pola trumpetisto Maciej Fortuna. (Foto: Nina Pietuchowska)



Maciej Fortuna en Arkones (Nina Pietuchowska)

## Esperante kaj kulture en Poznano

Ĉirkaŭ 160 personoj renkontiĝis la 22-24an de septembro en Poznano por la 33a ARKONES – la tradiciaj Artaj Konfrontoj en Esperanto, kiuj malfermas la aŭtunan sezonon en Pollando. La ĉefpunkto de la ĉi-jara programo estis la koncerto de la trumpetisto Maciej Fortuna, filo de la esperantisto Świątosław. En la ĵaza etoso estis prezentitaj – en la plenumo de neesperantista kantistino – versaĵoj de regionaj poetoj, kiujn esperantigis Lidia Ligęza. “Esperantaj Kantoj” estis tute profesia prezento, espereble ankoraŭ ripetota ie en Esperantujo. La muzikan programon riĉigis aldone esperantistoj, pli konataj al la publiko: *La Kompanoj*, Kimo, Jonny M kaj la nemalhavebla en ARKONES Zuzanna Kornicka.

Prelegoj, en du samtempaj blokoj, tuŝis grandan palettron da Esperanto-temoj: de AMO-seminarioj ĝis Zamenhof. Pri la tradukaj problemoj prelegis Ireneusz Bobrzak (nomoj de plantoj), Renato Corsetti (ĝenerale pri malfacilaĵoj en esperantigo) kaj Lidia Ligęza (dramoj de Stanisław Wyspiański). Roman Dobrzyński kaj Félix Manuel Jiménez Lobo prezentis novajn librojn. La centa mortodatreveno de Zamenhof speguliĝis en la prelegoj de Barbara Pietrzak (pri la kongresaj paroladoj) kaj Zbigniew Kornicki (pri la aŭtoro/iniciatoro de la lingvo). “Amble tra la Esperanto-poezio” iris Humphrey Tonkin, dum Aleksander Melnikov humure argumentis ke nia komunumo estas “kvazaŭetno”.

Nur malmultaj prelegoj rilatis al neesperantaj temoj. Ida Stria prezentis al la

partoprenantoj la skandinavajn runajn alfabetojn kaj Przemysław Wierzbowski rakontis pri la manĝokutimoj en la Zamenhofaj tempoj. La ĉeestantoj povis gustumi freŝe bakitan *hålaon* – pan-plektaĵon el gista pasto, kiun judoj kutime manĝas en ŝabato kaj aliaj festoj.

Apud esperantistoj el Pollando ĉeestis pluraj eksterlandanoj. Iomete malpli multaj ol kutime estis la junuloj. La malvarma, pluva vetero ĝenis la apudan piknikon de la Geja Fiero, kiu ekde kelkaj jaroj okazas en la sama semajnfino kiel ARKONES, sed ĝi helpis al la prelegantoj plenumi salonon. Ĉi-jare pri la aranĝo favore raportis la loka televidjurnalo.

**Paweł Fischer-Kotowski**

## 20 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj

Fondita en 1997 kadre de la Lingvistika Instituto (Fakultato pri Moderna Filologio) de UAM (Universitato Adam Mickiewicz, Poznań) la **postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj** startigis sian unuan grupon en 1998 kaj daŭre ĉiun trian jaron la sekvan. Nun, post 20 jaroj startis la **sepa interlingvistika grupo** kun 21 partoprenantoj el 12 landoj (Ĉinio, Koreio, Turkio, Brazilo, Usono, Francio, Svislando, Germanio, Hispanio, Ruslando, Kazaĥstano kaj Pollando). La unuan fojon aliĝis studentoj el Ĉinio, Koreio kaj Turkio, kio certigas pli grandan multkulturecon. La fondajo ESF (Esperantic Studies Foundation) jam de 15 jaroj disponigas kelkajn stipendiojn por la studentoj, kio ebligas pli grandnombrian partoprenon en la studoj.

La kursoj havis riĉan programon de la 16a ĝis la 20a de septembro: prof. Humphrey Tonkin gvidis la kurson pri esperanta kulturo prezentante ĝin en vasta historia fono; kontribuis prof. Aleksander Melnikov pri rilatoj inter lingvo kaj kulturo kaj pri personeco de esperantisto; krome d-ro Jukka Pietiläinen pri esperantaj revuoj. Same Humphrey Tonkin enkondukis la esperantan literaturon de la unua periodo koncentriĝante pri la poezio, sekvis lin Tomasz Chmielik kun la prozo de tiu epoko. Eblas aliri fonetikon samtempe interese kaj serioze – tion pruvis prof. Nicolau Dols Salas per sia kurso. Interlingvistiko (en pli malvasta senco) konsistigis la kurson de prof. Věra Barandovská-Frank, kiu jam povis uzi la proveldonon de sia universitata lernolibro pri interlingvistiko. Tiu ĝojiga evento malfermas la serion de lernolibroj de la Studoj fontante el la 20-jara sperto.

La malnova grupo kiu startis kiel rekorde granda, ankaŭ fine restis rekorda, ja 11 gestudentoj plenumis sian finekzamenon kun defendo de sia faklaboraĵo el la terenoj de lingvistiko (Karina Oliveira el Brazilo, Bengt Olof Aradson el Svedio kaj Arina Osipova el Ruslando), de interlingvistiko (Ida Stria kaj Michał Kozicki el Pollando), el lingvopedagogio (Felix Jimenez Lobo el Hispanio kaj André Staes el Belgio), de komunikado (Johan Derks el Nederlando/Serbio) kaj de literaturo (Rafael Zerbetto el Brazilo/Ĉinio, Fernando Pita el Brazilo kaj Xesus Moñños Pardavila el Hispanio), aldone kiel la dek-dua Paweł Fischer-Kotowski el la antaŭa grupo.



Foto: Stefan MacGill

Kiel kutime, la lingvopedagogia specialiĝo de la tria jaro konsistigas la instruistan trejnadon al kiu eblas aparte aliĝi kaj ricevi la instruistan diplomon de ILEI. Ĉi-foje tri partoprenantoj el Pollando (Krystyna Worobiej, Markéta Wilkus kaj Mariusz Hebdziński) kaj unu franco (Jean-Claude Roy) akiris ĝin post prezento de finlaboraĵo kaj kompleksa ekzameno.

La interlingvistikan sesion kompletigis la **4a Interlingvistika Simpozio** (21-22 sep 2017) kun la temo: “Rolo de internaciaj lingvoj ekde la epoko de Zamenhof ĝis la nuntempa multkultura mondo” kun la celoj festi la Zamenhof-jaron kaj la 20-jariĝon de la Studoj. Ĝi estis malfermita por granda publiko kun la oficialaj lingvoj: esperanto, angla kaj pola. Ĉirkaŭ okdek partoprenantoj el diversaj landoj traktis lingvopolitikon, planlingvojn kaj lingvistikon, literaturon, movadon kaj instruadon de esperanto en paralelaj sekcioj dum du tagoj, entute okazis 50 prelegoj.

Ĵaŭde por la malfermo la rektoro de UAM, prof. Andrzej Lesicki sendis gratulleteron; persone esprimis sian altan taksadon por la 20 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj prof. Maciej Karpiński, vicdekano de la Fakultato pri Moderna Filologio; Stefan MacGill salutis la simpozion en la nomo de UEA. La unua ĉefprelego – Humphrey Tonkin: *Esperanto: A Language Policy Assessment* (Esperanto: lingvopolitika taksado) – estis malfermita por kolegoj de la Lingvistika Instituto. Věra Barandovská-Frank parolis kiel la dua pri la tereno de interlingvistiko kaj prezentis la proveldonon de sia libro pri interlingvistiko. Vendrede same okazis du ĉefprelegoj: Ilona Koutny, gvidanto

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

## Velado al kongreso

Naŭ bravaj partoprenantoj de la Itala Esperanto-Kongreso atingis la kongresejon per velboato! Dum la semajno antaŭ la kongreso okazis septaga ŝipvojaĝo por esperantistoj sur la Ionia Maro en la pitoreska Golfo de Taranto (sud-orienta Italio, Mediteranea Maro). Ni veladis admirante de la maro la plej tipajn vilaĝetojn de la regiono kaj ĝiajn mirindajn naturvidindaĵojn.

La partoprenantoj venis el Francio, Bulgario, Svislando, Kroatio, Germanio, Ĉeĥio kaj Italio. Velumi estis ŝanco por interrilatiĝi kun samideanoj kaj ferii kune ene de la emociiga nekutima kadro de la velkrozado. Estis ebleco viziti interesajn lokojn en formo de respondeca turismo.

La partopreno estis malfermita al ĉiuj, kaj novicoj kaj velistoj. Ne estis bezonata antaŭa sperto pri velŝipado, tamen ĉiu partoprenanto ricevis la eblecon stiri la jaĥton kaj praktiki la velŝipajn manovrojn. La velkrozado estis didaktika travivaĵo, tamen ne estis kurso de faka Esperanto pri velado, sed kurso de velpraktikado en Esperanto. La jaĥtestro donis al ĉiu partoprenanto ilustritan kajeron pri velŝipaj manovroj en Esperanto. La jaĥtestro estis sperta itala velisto kaj velad-instruisto, volontulo, membro de Grupo Esperanto Tigullio.

La luita jaĥto "Bavaria 44" estas 14 metrojn longa, kun kvar kajutoj, dek kuŝlokoj, du necesejoj, kuirejo kaj saloneto. La enŝipiĝo okazis en la haveno de Policoro kaj dum la semajno ni navigis vizitante Gallipoli, Porto Selvaggio (Sovaĝa Haveno), Porto Cesareo kaj Taranto. Ni velis proksimume kvar-ok horojn ĉiutage, kaj la totala itinero longis ĉirkaŭ 150 marmejlojn. La vetero estis bona, kun norda vento 15-20 nodoj, sennuba ĉielo, varma temperaturo, pura mara akvo. Nur dum unu tago la vento estis tro forta, kaj ni profitis tion por resti tere kaj viziti la fortikigitan mezepokan citadelon de Gallipoli.

Ĉiutage ni faris mallongan lecionon de velad-praktikado kaj ĉiuj partoprenantoj lernis la nodojn, la jaĥtan stiradon, la velan reguladon, la ŝnuran ŝetadon, ktp. Ni vel-navigis efektive boardojn, ĝiradojn, bulenojn, ankradojn, albordiĝojn kaj aliajn emociajn velajn manovrojn. La juna partoprenanto Ŝebi el Ĉeĥio estis tute novico pri velado, sed ja li rapide lernis ĉiujn manovrojn, kaj dum la lastaj tagoj li estis la favorata helpanto de la ŝipestro.

Ni preskaŭ ĉiam manĝis en la jaĥto, dum la navigado aŭ ankrite, danke al la kunlaboro de ĉiuj partoprenantoj por la proviantado, kuirado kaj telerlavado. Apartan dankon al la itala partoprenanto Gianantonio, kiu estas tre lerta kuiristo! Nur unu fojon ni vespermanĝis en restoracio ĉe pitoreska fiŝfritejo en la antikva vilaĝeto de Gallipoli.

La tranoktadoj estis ĉiam ene de la jaĥto en du-kuŝlokaj kajutoj, ni tranoktis kelkfoje ĉe havenoj, kelkfoje ankrite ĉe golfetoj, tamen ni ankaŭ velis nokte: unu fojon ni atingis je noktomezo la golfeton por ankrado; alian fojon ni vekiĝis je la kvara horo matene por vidi la sunleviĝon navigante.



“Delfenoj! Mi vidis delfenojn, rigardu tie!” – diris Michèle dum sia deĵoro ĉe la rudro-rado. La velumantoj, ensorbite de la naturaj elementoj, estis en strikta kontakto kun la maro, vento kaj simpleco; sen bruo, sen malŝparo, sen urĝo. Velado estas sporto, kiu postulas reciprokan respekton, kunlaboron en deĵorteamo kaj justan kundividon de la rimedoj (akvo, nutraĵoj, energifontoj).

La lastan tagon ni revenis al la starta haveno, kie ni renkontis aliajn kongresanojn kaj ni invitis ilin trinki brandon en nia boato. Ĉiuj partoprenantoj havis belegan memoron de ĉi tiu semajno kaj, post la reveno hejmen, skribis al la grupo dank-mesaĝojn.

Ĉi tiu pozitiva travivaĵo stimulas nin organizi novan Esperanto-veladon dum la somero 2018.

**Alessandro Mazzetti**  
(la ŝipestro)

## La 84a Itala Kongreso de Esperanto

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

26 sep 2017 en la rekonstruita antikva ĉina urbo Tai'erzhuang (distrikto de la urbo Zaozhuang, prov. Ŝandongo), estis inaŭgurita ekspozicio "Semi esperon, trezori pacon k firmigi amikecon" por paco k amikeco inter Ĉinio k Pollando k 100a mortodatreveno de L. L. Zamenhof, subtenata de la ĉinia ministerio de eksterlandaj aferoj k organizita de la kultura sekcio de la polllanda ambasadorejo en Ĉinio k Ĉina E-Ligo. (*El Popola Ĉinio*)

La telefona E-aplikaĵo Amikumu ricevis premion pro noveca teknologio dum la lingva festivalo Langfest, kiu okazis la 25-28an de aŭgusto en Montrealo, Kanado. (*Esperanto*)

De 31 aŭg ĝis 10 sep 2017 en Rio-de-Ĵaneiro okazis la 18a Internacia Libro-bienalo de Rio-de-Ĵaneiro, la plej granda librofoiro en Latin-Ameriko, en kiu partoprenis aktivuloj de Asocio E-ista de Rio-de-Ĵaneiro. (AERĴ).

Giorgio Silfer kiel delegito de Kultura Centro E-ista (Svislando) reprezentis Eon en la 50a konferenco de Asocio de LingvoTestistoj en Eŭropo (ELTE), okazinta 21-23 sep en Luveno, Belgio. (HeKo)

Fine de aŭgusto aperis en Japanio la komputila ludo *Kotonoha Amrilato*, en kiu junulino trafas al mistera mondo, kie ĉielo estas rozkolora k ĉiuj parolas strangan lingvon Juliamo, kiu reale estas Eo; ŝi devas lerni ĝin. (Ret-Info)

Konga farmaciisto k esploristo Etienne-Flaubert Batangu Mpesa, kreinto de la farmaĉia esplorcentro en Luozi k honora membro de Demokratia Konga E-Asocio, kadre de la 27a Deontologia Tago de Konga Medicina Ordeno rakontis pri Eo al ĉ. du mil kongaj kuracistoj k alvokis ilin konsideri la agadon de ilia kolego d-ro Zamenhof. (Landa Agado)

18 sep Duan Yongxing, prezidanto de la Artkolegio de Kunming, faris raporton pri Eo al novaj lernantoj de la Kolegio de Aeronautika Inĝenierado k Kolegio de Amaskomunikiloj. La du subkolegioj malfermos devigan kurson de Eo, en kiu instruos Alessandra Madella el Italio, Choi Manwon el Sud-Koreio, Liu Baoguo k Li Lin el Ĉinio. (*El Popola Ĉinio*)

Asocio de Beninaj E-istoj enkondukis instruadon de Eo en la orfejo "La Providence" en la urbo Lokossa. (Landa Agado)

10 sep en la Sciencfikcia Biblioteko "Özgen Doğan Berkol" (distrikto Kadıköy en la Azia parto de Istanbul) por ĉ. 30 ĉeestantoj estis aranĝita 35-minuta prezento de Eo k 60-minuta enkonduka E-leciono. (Landa Agado)

Paralela Universo estas unutaga E-festo, okazanta en diversaj lokoj samtempe por ebligi paroli Eon nerete, renkonti novajn amikojn, k fari ĝuidajn memorojn; ĉi-jare 19 aŭg kadre de Paralela Universo okazis 35 eventoj en diversaj urboj (25 en 2016) kun partopreno de 322 e-istoj (231 en 2016). (*Esperanto*)

1 sep 2017 preskaŭ 2500 personoj ricevis retroŝtan konfirmon de UEA pri la aliĝo al la venontjara UK en Lisbono, kvankam ili nek aliĝis nek pagis; la amasmesaĝo estis dissendita pro mistajpo de retej-zorganto. Reale je 30 sep al la 103a UK aliĝis 181 personoj el 38 landoj; plej multe el Brazilo (17), Japanio (17), Portugalio (15), Germanio (14) k Usono (12). (*Libera Folio*, uea.org)

# Tribuno



Ĉi-foje en la rubriko *Vidpunkto* gastas la brita Esperanto-aktivulo Ian Fantom, eble la plej aktiva inter tiuj, kiuj en la Yahoo-grupo “uea-membroj” kritikas la agadon de la gvidantoj de sia landa kaj de la monda Esperanto-movadoj. Sed eble la plej kritika opinio en la oktobra *Ondo* troviĝas en la artikolo de Chamberline Nguiefack, kiu publike klarigas la motivojn de sia ekskonsuliĝo en la Esperanta Civito.



# Ĉu ni dronas en politika korekteco?

Kun intereso mi rigardis inviton de *La Ondo* verki artikolon kun miaj ideoj menciitaj en uea-membroj, kiel parton de la rubriko *Vidpunkto*, en kiu “pri la nuna stato kaj estonteco de Esperanto parolas konataj aktivuloj, kies opinioj ne estas tute identaj kun la tezoj de la Strategia Plano de UEA”. Sed kiu Strategia Plano? Mi ne vidis planon, nur eseon, sekvatan de seminarioj, komitatkunsidoj, kaj petoj de la generaloj por subteno de la trupoj. Bona generalo subtenas siajn trupojn ĉe la fronto.

Mi plulegis: “Ni neniel limigas la temon, amplekson kaj la stilon, sed ni nur petas laŭeble kritiki ne personon, sed ties konkretajn agojn, deklarojn kaj ideojn”. Mia menso turnis sin al la tempo antaŭ la epoko de politika korekteco. Antaŭ 50 jaroj mi pensus, “Kial li supozas, ke mi volas kritiki la personon, kaj ne ties agojn?” Mi verŝajne sentus tion kiel humiligeton, kian mi rimarkis de tempo al tempo dum la jaroj.

Sed nun tiu ideo, ke oni devas gardi sin kontraŭ ordinaraĵoj Esperantistoj kiuj volas senkaŭze ofendi eminentulojn en la movado, fariĝis ĝenerala. Tio ne estas nur Esperanta fenomeno, almenaŭ ne en la anglalingvaj landoj. Ofte oni aŭdas, “Mi estas ofendita”, kaj kelkfoje “Mi ne ŝatas vian tonon”.



Jeremy Corbyn

La televidstacio *Al Jazeera* en Britio dissendis en januaro dokumentadan filmon pri la Laborpartio<sup>1</sup>, en kiu ili plantis kaŝan raportiston. Ili filmis la kontraŭulojn al la gvidanto, Jeremy Corbyn. La tuta kampanjo estis bazita sur atakado de la persono, ne de tio kion li faras. Ili konstante serĉis pretekstojn por akuzi. La koteriestro estis filmita, dirante al siaj agentoj, kiel ili traktu siajn kontraŭulojn. Li diris: “Tiuĵ homoj estas misogenaĵoj, ili estas antigejaj, ili estas rasismaj, ili estas antisemitaj, ili estas reakciaj. Mi pensas, ke tion ni devas diri”<sup>2</sup>. Tiu ĉefulo estas ambasadoro en Londono. Mi ne diros por kiu lando, ĉar

tio estus konsiderata “antisemita”. Tamen se temas pri iu ajn alia ambasadoro estus seriozaj konsekvencoj. Ili filmis ankaŭ diskutojn pri “faligo” de brita kabinetministro, kaj tio ja kaptis la ĉefliniojn, sed nur por unu tago. La registaro akceptis pardonpeton, kaj malakceptis vokon de Jeremy Corbyn por enketo.

**Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# Demisiis la konsulino de la Esperanta Civito

*“Estimata Vickonsulo,*

*Dum la unuaj skajpkunvenoj ĉi-jare kaj poste tra niaj skribaj komunikadoj, mi konstatis ke mi faris al mi iluzion pri la Esperanta Civito. Ŝajnas ke mi estas nur idealisto.*

*Mi fariĝis esperantisto ĉar oni antaŭmetis al mi ĝian celon: paco “tra tuta la mond’; amo inter ĉiuj hom-fratoj...” Tio estis mia celo fariĝante konsulo, t. e. posteno kiu ebligus min decidi, iniciati, cele al tiu idealo. Sed ekde la komenco de la mandato, mi ekfeniluziigis. Kun hororo mi komprenis ne nur, ke ne mi – sed la posedanto de la afero – decidus, sed ankaŭ ke mi estis senskonscie kunkulpulo de kaŝita celo de la Civito.*

*PS: Kiam mi ekzemple rekomendis al la Vickonsulo, ke la Civito – kiu estas malbone taksata en la Esperanta medio – rimarkiĝu per pacema kunvivado kun aliaj organizaĵoj, do ke ĝi ĉesigu malamikajn, konfliktajn rilatojn kun UEA pere de Heko, la respondo venis, ke mi ne estas realisma, ke necesas konkurenco en la mondo...*

*Bedaŭrinde, mi ne eltenas konfliktan vivon (tio por mi ne estas vivo) kaj ne volas esti kunkulpulo de malicaĵ agadoj...*

*Tial, mi demisias de mia posteno de konsulo, sen venĝemo...*

*Afable, Chamberline Nguetack.”*



Per la supra komuniko la 3an de aŭgusto 2017 mi anoncis al Giorgio Silfer – la Vickonsulo de la Esperanta Civito – mian demision de la posteno de la Konsulino de la Esperanta Civito, post nur tri monatoj da konsuleco. En tiu afero kulpas neniu, sed la fakto ke pri io ĉiu komprenas siamaniere. Same, kiel diris Umberto Eco, multaj “homoj ĉiam perceptas Esperanton kiel la proponon de iu ilo. Ili scias nenion pri la idealo kiu vivigas ĝin”. Tamen ekde la komenco sorĉis min en Esperanto nur ĝia ideala, profunda celo; tiom ke mi ne konsciis, ke ekzistas du kategorioj de esperantistoj. Tial mi konsentis kandidatiĝi al la konsuleco de la Esperanta Civito por pli bone kontribui kaj koni pli profunde tiun organizaĵon en kiu mi aliĝis; ĉar, kiel diris Fabricio Valle, “la Esperanta Civito estas ne alirebla eĉ al la Civitanoj mem”.

Kiel ekis mia eksiĝo de la posteno de konsulino?

Tiu deziro ekis kiam, dum skajpkunveno komence de mia mandato, Silfer deklaris, ke “UEA baldaŭ mortos”; kaj Conde Rey replikis kun plendanta voĉo: “Kiam Giorgio, kiam?” Mi ne kredis miajn orelojn: kia celo! Kaj la aliaj scias kaj

eĉ kunlaboras delonge pri tio! Nur mi en la grupo estas kiel blinda ŝafo, konsiderante eĉ sencelaj la senĉesajn verkojn de Silfer pri UEA. Mi ektimis pri la laboroj de tiu grupo: ĉu oni uzas min por celoj kaŝitaj de mi? “En kion mi metis min?”, – mi pensis. Mia sango frostiĝis. Tuj post la kunveno mi rakontis la malkovron al afrika esperantisto, ĉar mi bezonis ke iu trankviligu min. Pri tiu malkovro temas mia demisiomesaĝo: “kun hororo mi komprenis ... ke mi estis senkonscie kunkulpulo (komplico) de kaŝita celo de la Civito”. Verŝajne, Silfer revas regi la mondon esperantistan, kiel implikis tiu lia esprimo en HeKo kadre de la intervjuo rilate al la balotkampanjo de la Civito en 2016: “La malnova Esperantio estas en krizo: SAT stagnas, UEA konflikta pri TEJO, ktp. Sed ĉu nova Esperantio jam pretas?”

Tamen mi ne havis la saman revon. Tion montras mia teksto de la 9a de marto 2017 ene de nia afrika WhatsApp-a retgrupo: “Mi ĉiam servos la intereson de EC (Esperanta Civito) dum mia mandato, sed kun justeco; tial mi ne konsideras min malamiko de UEA ĉar Esperanto estas por paco”.

Tial, trankviliĝinte, venis al mi la ideo uzi mian pozicion de Konsulo por haltigi la masakradon, t. e. por bremsi aŭ detru tiun malican planon de Silfer kaj lia grupo. Mia zorgo ne estis UEA – ĉar mi scias, ke ĝi estas la ĉefa Esperanto-asocio, la kerno mem de la movado, kaj ĝi ne facile mortus. Do, mia intenco estis unue kaj precipe flegi la agadon de la Esperanta Civito, ke ĝi fariĝu pacema – do forta – organizaĵo, kiu ne bezonu vivi tra manipulado de aliuloj. Tial ne nur pri UEA mi klopodis flegi la Civiton sed ankaŭ pri la Afrika Esperantio, kiun ĝi uzas por siaj interesoj. Luj afrikanoj jam tion konscias. Jen alia teksto mia en nia retgrupo, en kiu mi kvietigas fraton, la 22an de februaro 2017 “... tamen tio ne konduku nin al rasismo: ni estas Esperantistoj, pacemaj homoj, konsiderantaj ĉiujn homojn de l'mondo gefratoj. Tial ni restu firmaj pri nia pozicio je esti respektata, tamen sen malamo, sen perforto”.

Por atingi mian celon, flegi la Esperantan Civiton, la 19an de majo 2017 mi sendis al la Vickonsulo retmesaĝon, rekomendante, ke ĉesu liaj obsedaj artikoloj pri UEA: “Kara Vickonsulo,

*Mia vizio estas unue ke Esperanto celas pacon, pacon, pacon. Tial, oni senlace kaj pacience celu nur al ĝi. Tio signifas ke laŭ mi EC ne havu konfliktajn rilatojn kun aliaj Organizaĵoj; ĝi ne estu la opozicio de UEA aŭ SAT aŭ... Ĝi do ekzistu paralele de la aliaj sen serĉi ke UEA malaperu. Ne estu eĉ konkurenco kun ĝi. Kion ajn faras aŭ ne faras aŭ diras UEA eĉ pri la Civito, oni respondu nur se ekstreme necesa, t. e. se la respondo kondukos al paco.*

**Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa oktobra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Arkivo



Antaŭ cent jaroj, la 10an de oktobro 1917 naskiĝis Ralph Lindsay Harry (1917-2002), aŭstralia diplomato, spionestro, verkisto kaj esperantisto; prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio, vicprezidanto de la internacia jurista asocio IEAJ, verkisto, tradukanto kaj vortaristo. Okaze de la jubileo ni publikigas artikolon pri li el la baldaŭ eldonota enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (NDK), kiu entenas biografiajn artikolojn pri ducent elstaraj esperantistoj.

## Ralph Harry

**Harry, Ralph Lindsay** (1917–2002). Aŭstraliano. Naskiĝis la 10an de marto 1917 en Geelong (prov. Viktorio); la plej juna infano en la kvarinfana familio (la kvina infano frue mortis). Patro: instruisto kaj lernejestro Arthur Hartley Harry (1876-1961); patrino: Ethel Roby Harry (den. Holder, 1878-1965), filino de Frederick Holder (1850-1909), ĉefministro de Suda Aŭstralio kaj la unua prezidanto de la Aŭstralia Parlamento (1901-09).

En 1934 R. Harry finis lernejon de Launceston en la insulo Tasmanio, kie la familio ekloĝis en 1922, kiel la plej bona lernanto kaj sportemulo. Studis en la Tasmania Universitato (1934-38), aktivis en la kristana studenta movado. Pro sia bona studado ricevis la stipendion Rhodes kaj kompletigis siajn studojn en Oksfordo kiel bakalaŭro pri juro (LL.B.) kaj arto (B.A.) en 1939-40.

En 1940 li revenis al Aŭstralio kaj eklaboris en la ministerio pri eksteraj aferoj. En 1942 aliĝis al la armeo kiel oficiro kaj analizisto en esplorservo. Servis en la reprezentejo de Aŭstralio en Kanado (1943-45). Estis membro de la aŭstralia delegacio ĉe la fonda konferenco de UN (Sanfrancisko, 1945), aktive partoprenis en la verkado de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, en 1948 estis aŭstralia delegito ĉe UN kaj laboris en la aŭstralia ambasado en Vaŝingtono. En 1949 revenis al Aŭstralio, kie partoprenis en la formado de ANZUS (milita alianco de Aŭstralio, Nov-Zelando kaj Usono), kies statuton li verkis. Ĉefkonsulo kaj konstanta delegito de Aŭstralio ĉe la UN-oficejo en Ĝenevo (1953-56), komisiito de Aŭstralio en Singapuro (1956-57). Direktoro de la aŭstralia sekretservo ASIS (Australian Security Intelligence Service, 1957-60).

En 1960 R. Harry revenis al diplomatio: vicsekretario de la ministerio pri eksteraj aferoj (1960-65), ambasadoro en Belgio kaj Eŭropa Komunumo (1965-68), ambasadoro en la Suda Vjetnamio (1968-70), ambasadoro en FR Germanio (1970-75), ambasadoro kaj konstanta reprezentanto de Aŭstralio ĉe UN (1975-78). Reprezentis Aŭstralion en pluraj internaciaj konferencoj. Post la emeritiĝo (1978) dum tri jaroj estis direktoro de la Aŭstralia Instituto pri Internaciaj Aferoj. Verkis plurajn fakajn kaj prihistoriajn studojn kaj beletraĵojn.

R. Harry ricevis la ordenon de la Brita Imperio (CBE, 1963) kaj la ordenon de Aŭstralio (AK). En 1944 edziĝis en Otavo kun Elsie Dorothy Sheppard (1908-94). Tri infanoj: John Harry, Penny Clarey kaj Virginia Braden Woolley. Mortis la 7an de oktobro 2002 en Sidnejo.

R. Harry esperantistiĝis en 1937. Fondis E-klubon en Kanbero (1950). En 1953 verkis raporton pri Esperanto en Aŭstralio, kiun la registaro sendis al Unesko. Estis prezidanto de AEA en du periodoj (1960-61, 1986-88), vicprezidanto de la jurista asocio IEAJ (1979-87). Adjunkto de AIS de 1987.

Li tradukis en Esperanton el la angla kelkajn oficialajn dokumentojn de UN. Verkis sportajn konversaciajn vortarojn por la Olimpikoj en Munkeno (1972) kaj

Montrealo (1976). Aktiviĝis pri verkado post la emeritiĝo. Kun V. Gueltling pretigis tri eldonojn de la Aŭstralia-Esperanta vortaro (1983, 1985, 1990), kies kvara eldono en kunlaboro de B. Fox aperis kiel *Australian & New Zealand Esperanto Dictionary*. Verkis terminaron pri briĝo. Libro de liaj rememoroj *The diplomat who laughed* (1983), originale verkita angle, en 1997 aperis en Esperanto. Liaj artikoloj kaj studoj aperis en multaj kolektoj, i.a. en *Language and the right to communicate* (1978), *Esperanto the solution to our language problems* (1981), *Esperanto in the modern world* (1982), *Akademijaj studoj* (1985), *Ekologio* (1992), *Internacia jaro de familio* (1995); *Esperanto, interlinguistics and planned language* (1997); en la festlibroj omaĝe al J. Régulo kaj I. Lapenna. En 1967 R. Harry iĝis membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Laŭreato de la premio Degučiči (1988).

**Ĉefaj verkoj:** *La ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj* (Tr., 1952); *La internacia reĝimo de Antarkto* (1968); *Konvencio de Vieno pri diplomataj rilatoj* (Tr., 1970); *Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj statuto de la Internacia Kortumo* (Tr. kun I. Lapenna kaj E. Svane, 1970); *Esperanto: lingvo de la sporto* (1972); *Esperanto, internacia lingvo de amikeco* (1976); *Language equality* (Kun M. Mandel, 1979); *Studlibro por kandidatoj por la elementa diplomo* (Kun K. G. Linton, 1981); *Aŭstralia-Esperanta vortaro* (Kun V. Gueltling, 1983); *The diplomat who laughed* (1983); *Vortoj kun flugiloj* (1984); *Briĝo: 5-lingva terminaro* (1985); *Hayden B. Atomoj por paco* (Tr., 1985); *Deklaracio de Rio-de-Ĵanejro* (Tr., 1992); *Aventuroj en Esperantujo* (1994); *Kelen S. Mi memoras Hirosimon* (Tr., 1995); *La diplomato kiu ridis* (1997); *Australian & New Zealand Esperanto Dictionary* (Kun B. Fox, 2000); *Adventures in Esperantoland* (2001).

**Pri Ralph Harry:** AIS, p. 293-294; KEK, p. 87; OVP, p. 101. *Novaj membroj de la Honora Patrona Komitato. Ralph Harry* (*Esperanto*, 1967, №10); *Steele T. Ralph Harry (1917-2002)* (*Esperanto*, 2002, №12); *Steele T. Ĉu fama esperantisto estis spionestro?* (*La Gazeto*, 2005, №121); *Dasgupta P. Ralph Harry – persona omaĝo* (*Esperanto*, 2008, №12); *Harry J. Bening master of diplomacy* (<http://www.smh.com.au/articles/2002/10/23/1034561547232.html>).



## Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Aŭtoroj: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonantoj: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Aperos en la fino de la Zamenhofa Jaro 2017

Prezo: 30 eŭroj

Jam antaŭmendebla kontraŭ 25 eŭroj

# Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2017

**1.** Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Hector Hodler** (1887-1920), ĵurnalisto kaj esperantisto, kunfondinto kaj kunredaktoro (kun Edmond Privat) de *Juna Esperantisto* (1903), posedanto kaj redaktoro de la revuo *Esperanto* (1907-20); kunfondinto (1908), vicprezidanto (1908-11), direktoro (1911-19) kaj prezidanto (1919-20) de UEA; la ĉefideologo de UEA. Testamentis al UEA grandan monsumon, la revuon *Esperanto* kaj sian bibliotekon.

**10.** Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Ralph Lindsay Harry** (1917-2002), aŭstralia diplomato, direktoro de la aŭstralia sekretservo ASIS (1957-60), verkisto kaj esperantisto; prezidanto de Aŭstralia E-Asocio (1960-61, 1986-88), vicprezidanto de la jurista asocio IEAJ (1979-87). Harry tradukis en Eon kelkajn oficialajn dokumentojn de UN kaj verkis kelkajn librojn, i.a., sportajn vortarojn por la Olimpikoj en Munkeno (1972) kaj Montrealo (1976).

**15.** Antaŭ 80 jaroj pro partopreno en la agado de kontraŭrevolucia trockiista esperantista organizaĵo SEU estis pafekzekutita **Eŭgeno Miĥalski** (Евгений Иосифович Михальский, 1897-1937), bibliotekisto, instruisto kaj esperantisto, talenta poeto, aŭtoro de la poemaroj *Prologo* (1929), *Fajro kuracas* (1932) kaj *Kantoj de amo kaj sopiro* (1934).

**16.** Antaŭ 25 jaroj forpasis **Antanas Poška** (1903-1992), litova kaj sovetunia antropologo, arkeologo, vojaĝanto, ĵurnalisto kaj esperantisto. Poška preparis kaj realigis siajn vojaĝojn per Esperanto, parolis en Esperanto-programoj de Litovia Radio (Kaŭno), estis prezidanto de Litova Esperanto-Asocio antaŭ ties likvido en 1940. Post reveno el ekzilo en Centra Azio (1945-1958) li reaktiviĝis kaj en la 1960aj jaroj prezidis la Esperanto-klubon en Vilno.

**26.** Antaŭ 20 jaroj forpasis **Rikardo Ŝulco** (Richard Schulz, 1906-1997), gimnazia lingvoinstruisto, esperantisto, fondinto de la "Analiza Skolo", aŭtoro kaj tradukinto de pluraj libroj, i.a.: *Mein geliebtes Esperanto* (1976), *La perdita honoro de iu Katarino Blum'* (Heinrich Böll, 1978), *Pledo por Unueca Lingvo* (1985), *Sur la Vojoj de la Analiza Skolo* (1987) k. m. a.

**27.** Antaŭ 80 jaroj "pro fondo kaj gvidado de kontraŭsovetunia trockiista terorista organizo de esperantistoj kun la celo efektiviĝi en ĝia kadro sabotan-teroristan agadon kaj spionadon por Germanio" estis pafekzekutita **Ernest Drezen** (Ernests Vilhelms Drēziņš, 1892-1937), latva sovetunia terminologo, ŝtatoficisto, interlingvisto kaj esperantisto. De 1921 ĝis 1936 li gvidis la Esperanto-movadon en Sovetunio, kontraŭstaris sennaciismon de Lanti en SAT. Inter liaj verkoj elstaras *Historio de la Mondolingvo* (E-versio, 1931) kaj *Analiza historio de Esperanto-movado* (1931).

**29.** Antaŭ 120 jaroj naskiĝis Jakobo Ŝapiro (Jakub Szapiro, 1897-1941), pollanda juda ĵurnalisto kaj esperantisto, kunfondinto (1922) kaj prezidanto (de 1924) de Esperanto-Societo "Ludoviko Zamenhof" en Bjalistoko, aŭtoro de *Babiladoj de Bonhumora Zamenhofano* (1921). Mortpafita (kun multaj bjalistokaj judoj) de germanaj nazioj post la invado en Bjalistokon.

# *Kulturo*



La plej ampleksa materialo de la oktobra *Ondo* estas dediĉita al la poetino Marina Ivanovna Cvetajeva (1892-1941), kies 125an naskiĝdatrevenon ĉi-monate festas la ŝatantoj de la rusa poezio en la tuta mondo kaj – danke al Ludmila Novikova – ankaŭ en Esperantujo.



# Ĉielido kun cigna animo

de Ludmila Novikova

*Dance paŝante, mi iris sur ter'! Ĉiel-id'!  
Kun plentuko da rozoj! Senvelka karmino!  
Mortos mi ĉe la aŭror'. – Nokton de raba bird'  
Dio ne sendos ja por mia cigna animo!*

M. Cvetajeva

(El "Mortos mi dum ĉielruĝo", 1920)

Marina Cvetajeva [Цветаева, pron.: cvetájeva], klasikulo de la Arĝenta Epoko de la rusa literaturo, okupas apartan lokon en la koro de ĉiu ŝatanto de la rusa poezio. Eble pro la senprecedenca tragikeco de ŝia sorto, kiun ŝi antaŭsentis ekde sia junaĝo, kaj kiu estis kun doloriga esprimforto reflektita en ŝia poezio. La saman percepton de la specifeco de la poetino havis Iosif Brodskij: "La poezio de Cvetajeva plejparte diferencas disde kreaĵoj de ŝiaj samtempuloj per ia apriore tragika tono, per implicita – en la versoj – ploregoj... Mi opinias, ke Cvetajeva estas la unuaranga poeto de la 20a jarcento".

Por la tuta poezia kreado de Cvetajeva estis karaktera simboligo de la propra sorto. Ŝia ŝatata arbo estis sorpujo kun ties amaraj fruktoj, kaj ŝi plurfoje markis siajn versaĵojn per tiu ĉi simbolo de maldolĉa sorto, kiu ĉiam altiris ŝin:

Sorpoj ruĝberis  
Tra foli-rond'.  
Tiam aperis  
Mi en la mond'.

<...>

Mi nunejara  
Revas pri ronĝ'  
De ar' amara  
Da sorpa ruĝ'.  
(1916)

Poste ŝi uzis la saman simbolon en la poemo "Al Anjo" (1918), dediĉita al la filino Ariadna:

Sibilo! Por kio porci'  
Al id' mia – da tia sorto?  
Ja rusa destino – por ŝi...  
Viv' ŝia: Rusio kaj sorpo...

Multe pli poste, kiam la poetino suferis en la kondiĉoj de elmigro post la revoluciaj eventoj en Rusio, ŝin jam konsolis tiu ĉi amara simbolo de la patrotero:

Samfremdas ĉiu hejmo, temp!  
Kaj samegalas ajnaj sortoj.  
Sed se arbust' de temp' al temp'  
Troviĝas – kun helruĝaj sorpoj...  
(El "La patrotero! Nostalgj", 1934)



La vivan kaj kreaĵojn de la poetino ni sekvu laŭ la plej gravaj por ŝi jaroj.

**1892.** Naskiĝo de Marina Cvetajeva en Moskvo la 26an de septembro (Gregorie: la 8an de oktobro) 1892. Ŝia patro Ivan Cvetajev (1847-1913), fama filologo kaj artologo, estis tiam profesoro de la Moskva Universitato, direktoro de la muzeo Rumjancev kaj fondinto de la Muzeo de la belartoj A. Puŝkin en la strato Volĥonka, kiu nun estas unu el la plej gravaj muzeoj en Moskvo. La patrino de Marina – Maria Cvetajeva (Fraŭline: Mein, 1868-1906) – estis pianistino.

**1896.** La unuaj signoj de la poezia talento de Marina. Ŝia patrino skribis en sia taglibro: "Mia kvarjara Marusja<sup>2</sup> vagas ĉirkaŭ mi kaj ĉiam kunmetas rime la vortojn – ĉu eble ŝi estos poeto?". Tamen ŝi revis vidi la filinon muzikistino kaj verve instruis ŝin kaj ŝian pli junan fratino Anastasija pri pianludo.

**1899.** Estis finita la unua versa kajero de Marina, kiu ne konserviĝis. Ekde sia sepjara aĝo Marina senĉese legas librojn de la hejma biblioteko. Ŝi vivas en la mondo de sia propra animo: plejparte per peripetioj de ĉefpersonoj de siaj ŝatataj libroj, precipe tiuj de la verko "Aglido" de la franca poeto kaj dramaturgo Edmond Rostand.

**1902.** Pro grava malsaniĝo de la patrino (oni diagnozis tuberkulozon) la familio translokiĝis eksterlanden, kie dum tri jaroj ili ŝanĝis tri landojn: Italion, Svislandon, Germanion.

**1906.** La 5an de julio mortis la 38-jara patrino de Marina. La 14-jara knabino ricevis la unuan animskuan sortobaton. Kiom da ili ŝi ricevos poste! Aŭtune Marina proprainiciate ekloĝis en la internulejo de moskva privata gimnazio, forlasinte la hejmon en Moskvo por ne senti sin orfa sen la patrino. Tamen la malobeema karaktero de Marina malhelpis al ŝi longe resti en tiu kaj aliaj gimnazioj: dum kvin postaj jaroj ŝi trifoje ŝanĝis lernejojn.

**1908.** Marina verkis jam seriozajn versaĵojn.

**1909.** Aperis la unua poeto en la vivo de Marina – Ellis (Lev Kobilinskij), kiu faris malsukcesan edziĝproponon al Marina. Post la rifuzo de Marina iliaj rilatoj restis amikaj, kaj Ellis gvidis la junan poetino en la moskvan poezian rondon. Somere Marina sole veturis

**Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa oktobra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Literatura konkurso *Liro*-2017

La redakcio de *La Ondo de Esperanto* denove invitas al la tradicia literatura konkurso *Liro*. Same kiel en la du lastaj jaroj, ankaŭ en 2017 la konkurso havos nur tradukajn branĉojn.

Por *Liro*-2017 estas proponataj du tradukendaj verkoj:

1. Traduko el la angla: *To the Man on the Trail* – novelo de Jack London;

2. Traduko el la rusa: *Obruĉ* – novelo de Fjodor Sologub.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la retejo de *La Ondo de Esperanto*:

<http://esperanto-ondo.ru/Ind-liro.htm>

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Sendu kvar tajpitajn aŭ komputile kompostitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). Oni povas sendi la tekstojn rete (slipoj estu sendataj en apartaj mesaĝoj), al la retadreso sezonoj@yahoo.com.

La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 31a de decembro 2017.

La laŭreatoj (unu en ĉiu branĉo) ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizantoj ĝis la 1a de januaro 2021 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la premiitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike.

La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizantoj en okazo de libroforma eldono. La plej bona traduko de la novelo de Jack London aperos en la antologio de anglalingva literaturo, eldonota de *Sezonoj*.

**Bonŝancon!**

**Halina Gorecka**  
sekretario de *Liro*-2017

*La jarabono por 2018 kostas nur 15 eŭrojn*

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# *Mozaiko*

La redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al kunlaboro en la sekcio “Mozaiko” karikaturistojn, humoristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.



## Pri kiu(j) temas? La fina rezulto

Al la 9a versportreto de Valentin Melnikov, kiu bildigas **Dmitrij Ŝevĉenko**, venis sep respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Malcolm Jones (Britio), Lydia Lindla (Estonio), Anne Jaussions (Francio), Bernhard Westerhoff (Germanio), Dorota Burchardt, Paweł Fischer-Kotowski kaj Russ Williams (Pollando).

**Chuck Smith**, verse portretita de Valentin en la 10a enigmo, estis ĝuste identigita de ĉiuj kvin respondintoj: Malcolm Jones (Britio), Lydia Lindla (Estonio), Bernhard Westerhoff (Germanio), Paweł Fischer-Kotowski kaj Russ Williams (Pollando).

Entute, 18 personoj sendis ĝustajn respondojn por ĉi tiuj kaj pli fruaj versenigmoj de **Valentin Melnikov**, kiun ni dankas pro la materialo por la tutjara konkurso.

La ĝustajn respondojn por ĉiuj dek enigmoj sendis du personoj **Malcolm Jones** kaj **Russ Williams**, kiuj estas venkintoj en la konkurso. Al ili ni sendos po ekzempleron de la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegare* tuj post la eldono. Je du poentoj de la venkintoj postresis Anastasia Otsterchil (Moldavio) kaj Paweł Fischer-Kotowski (Pollando), kiuj sendis po ok ĝustajn respondojn, kaj je tri – Dorota Burchardt (Pollando).

Ni dankas ĉiujn partoprenantojn kaj gratulas la venkintojn!

---

## Kelkaj konsiloj por plibonigi sian stilon

Antaŭ dek ok jaroj en *La Ondo* aperis konsilaro de Valentin Melnikov por komencaj aŭtoroj. Nu, ĉar nur malmultaj havas la jarkolekton 1999 de nia gazeto, ni petis al Valentin iomete aktualigi ĝin antaŭ la nuna republikigo. Li afable konsentis.

1. Se vi anstataŭas substantivon per pronomo, do uzu lin korekte.
2. Ne forgesu akuzativo kaj uzu ĝi ĉie, kie necesas.
3. Tamen superfluan akuzativon ne devas aperi en viajn verkojn.
4. Ne trouzu je la prepozicio "je", ĉar se vi kulpos je tio, oni taksos vin je malbona esperantisto.
5. La sama rimarkumo rilatas al la sufikso "um": se vi, vortumante vian cerbumaĵon, ne povumas trovi pli taŭgan solvumon, vi estas fuŝumisto!
6. Nekompletaj frazoj — malbone!
7. Uzu nur simplajn kaj klarajn frazojn, ĉar se vi estus uzanta komplikajn konstruaĵojn, vi povos esti forgesanta, pri kio vi devis esti rakontonta, kaj la legontoj estos perdantaj la tutan intereson al vi.
8. Kio koncernas nefinitajn frazojn
9. Tro-uzo de divid-strekoj ĉiam aspektas mal-agrable.
10. Precizigoj enkrampe (eĉ se gravaj) estas (kutime) superflujaj.
11. Nekonvena metaforo similas abomenan bufon, kiu per siaj nigraj flugiloj ŝirmas lumon de la kristale pura fonto, do indas ĝin elsarki.

12. Malgranda rimarko pri ripetadoj, kiuj fojfoje aperas en verkoj versaj kaj prozaj, kiuj estas publikigataj en gazetoj kaj libroj, kiuj estas eldonataj ĉe ni kaj eksterlande, kiuj sufiĉe malklarigas la penson, kiun volis eldiri la aŭtoroj, pri kiuj ni volis fari tiun ĉi rimarkon.

13. Laŭ nia profunda konvinko, ni opinias, ke la aŭtoro, kiam li skribas sian propran verkon, tutcerte ne devas agi laŭ tre malbona kutimo, kies esenco estas en tio, ke oni uzas tro multe da nebezonataj kaj superflujaj vortoj, kiuj reale tute ne estas necesaj por esprimi la aŭtoran penson.

14. Ne elpensu tro longajn vortojn: vi povas enembarasegiĝi, se ili estos neklarelparoleblaj kaj miskomprenigantaj.

15. Se via verko estos hiperplena da redundaj neologismoj, ĝi aspektos turpe kaj hide, kaj oni etikedos ĝin mava.

16. Malbone sciante la gramatikon, komplikaj frazoj estu uzataj singarde!

17. Superflujaj pronomoj, ili ne estas bezonataj.

18. Mallerteco de uzado de la prepozicio "de" povas esti kaŭzo de malapero de intereso de legantoj de via verko.

19. S-anoj, bv. ne mllg.

20. Pri la ordo de vortoj zorgu nepre, ĉar la en Esperanto libera, rusan lingvon simile, de la vortoj ordo, el la neceso sian penson klare esprimi, ne liberigas.

21. Ne flatu al la redaktoro. Niaj redaktoroj estas la plej bonaj en la mondo kaj tute ne bezonas superflujajn komplimentojn.

22. Versaĵojn vane ne verkadu, / kaj adasismojn ne uzadu!

23. Se vi estimas viajn legantojn - ne uzu foreign languages. Don't alligator! Don't crocodile! Не надо крокодилить!!!

Instruis **Valentin Melnikov**

Premiere aperis en *La Ondo de Esperanto*, 1999, №7, p. 18

---

## Kurioza kredito

Novjorka ĉino, forveturonte por du semajnoj al siaj parencoj en Ĉinio, venis al unu el Novjorkaj bankoj kaj petis disponigi al li krediton je kvin mil dolaroj por du semajnoj. Kiel garantiaĵon li proponis sian sportan aŭton *Ferrari*, kiu kostas \$250.000.

Post du semajnoj la ĉino redonis al la banko la pruntitajn 5 mil dolarojn plus procentaĵon por 14 tagoj – 15 dolarojn kaj 41 cendojn. Post la faritaj formalajoj li gajmiene reprenis sian luksan aŭton.

Kiam la bankoficisto demandis lin, kial li prenis tiom etan prunton por mallonga tempo kontraŭ tiel multekosta garantiaĵo, la kontenta posedanto de *Ferrari* klarigis, ke dum lia foresto ne eblus trovi lokon por duonmonata sekura gardado de tia aŭto en Novjorko kontraŭ 15 dolaroj.

Plukis kaj tradukis **Kukucapa Nemoskovskaja**

# **Spritaj splitoj kaj preskeraroj**

## ***El la kolekto de reduktoro***

### ***Tute elpremita, aŭ: Etnisma pulpulino***

Vi certe rimarkis, ke vi ankoraŭ ne ricevis la unuan numeron de la jaro, kiu normale aperas fine de junio. Via redaktorino senpulpiĝas... (Letero al la legantoj de *Etnismo*, redaktoro Nicole Margot al la membroj de IKEL, 11 sep 2017)

### ***De granda libro ne atendu sencon***

Malgraŭ relativa grandeco de la libro, en ĝi ne estas sensencaj rezonadoj... (Nikolao Gudskov: *Fama klasikaĵo kun iom alia kaj nova enhavo, La Ondo de Esperanto*, 2017, N<sup>o</sup>8-9, p. 61)

### ***La stranga butikoj***

1.35. Amo kaj morto en balo. Vicki Baum. UEA, Rotterdam, 1986... 1.582. Historio de la mondolingvo: tri jardentoj da serĉado. 3a eldono. (CDELI, Disponeblaj brokantaĵoj, [http://www.cdelli.org/brokanta\\_servo\\_libroj.pdf](http://www.cdelli.org/brokanta_servo_libroj.pdf); trakribis Paweł Fischer-Kotowski)

### ***Steele, franca krimulido?, aŭ: Tel père, tel fils?***

Poste vi ĉion scios pri mafianoj père de Trevor Steele. (Jak Le Puil en *La Kancerkliniko*, 2017, N<sup>o</sup>163, p. 3)

### ***Kandidatu soluloj***

Malferma alvoko: TEJO dungas eksterrilatan oficiston (<http://tejo.org/malferma-alvoko-tejo-dungas-eksterrilatan-oficiston>)

### ***Solula amĝuego***

Unue, memorgio pri la ŝtata kolektivo BRICS... (Stefan MacGill: *AMO turnas sin al BRICS*, cirkulero EKO 24, 2 sep 2017)

### ***Unupersona apo***

Amikumu estis prezentita por ĝia Ĉefa teknika oficisto Chuck Smith (<http://yuryjakymec.blogspot.de/2017/09/lancfestoj-de-la-apo-amikumu-en-toronto.html>)

### ***Jarlibre Inferen, aŭ la malbeno de Danto?***

Laŭ mi, la plej efika procedo estas unue krei en la CO kiel eble plej ĝisdantan version de la reta JL. (Amri Wandel, <https://groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/topics/10435?reverse=1>, 29 aŭg 2017)

### ***Finfine pruvite!***

La 3a Internacia Simpozio en Vroclavo (Pollando) pravas funkciadon de Esperanto (*Eŭropa Bulteno*, 2017, N<sup>o</sup>171, p. 22)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

## Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

**Argentino:** Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: [rosar@fibertel.com.ar](mailto:rosar@fibertel.com.ar).

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: [libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au).

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at).

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: [bel@esperanto.org.br](mailto:bel@esperanto.org.br).

**Britio:** EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk)

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg).

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: [Cea.polnicky@quick.cz](mailto:Cea.polnicky@quick.cz).

**Ĉinio:** Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: [agrikulturo@126.com](mailto:agrikulturo@126.com).

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: [arne-casper@email.dk](mailto:arne-casper@email.dk).

**Estonio:** Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: [ahto.siimson@esperanto.ee](mailto:ahto.siimson@esperanto.ee).

**Finnlando:** EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: [paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com).

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org).

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: [swanzer@esperanto-buchversand.de](mailto:swanzer@esperanto-buchversand.de).



**Hispanio:** Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

**Hungario:** Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapeŝt. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

**Hungario:** Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapeŝt, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

**Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

**Katalunio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

**Kroatio:** Marija Beloŝević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

**Meksiko:** Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

**Nederlando:** Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

**Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

**Nov-Zelando:** G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

**Pollando:** Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

**Ruslando:** Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

**Serbio:** Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

**Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch\_scheidegger@bluewin.ch.

**Usono:** Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

*Neniam sendu monon en kovertoj!*

# RIGARDU LA ĈIELON EN ESPERANTO!



-----  
Ĉe unika planetario en la mondo

- Prelegoj kaj atelieroj kun Amri Wandel, David Galadí-Enríquez, Miguel Fernández, Jorge Camacho, Abel Montagut, Miguel Gutiérrez Adúriz, Michael Boris Mandirola, k.a.
- Programeroj por infanoj
- Koncert-balo de Kaj Tiel Plu
- Kultura kaj natura postkongreso



## 38a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO

-----

Àger-Montsec, de la 12a ĝis la 15a de oktobro 2017

